Universala Esperanto-Asocio

KLERIGO

OKCIDENTE KAJ ORIENTE

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2018-18 sendita el Budapeŝto, la 5an de julio.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# De lundo al mardo – klerige ambaŭkaze

Nia antaŭa EKO-komuniko (17) prezentis la tiaman staton de la preparoj por la Kleriga Lundo en la 103a Universala Kongreso en Lisbono. Ni daŭrigas nian taskon doni al kongresanoj informojn, per kiuj ili pli efike povu elekti la preferatajn erojn. Nu, tradicie ankaŭ mardo estas kleriga tago, ĉar temas pri la Tago de Lernado, prizorgata de nia instruista faka asocio ILEI.

Sube ni listigas la prelegetojn aŭ prezentaĵojn planatajn. Ili ne aperas en la tempa vicordo, do serĉu pli lastmomentan informon surloke, ekzemple en la unua kongresa kuriero.

João Santos (Portugalio): la portugala eduksistemo - KONFIRMO ATENDATA

- Transdono de la PREMIO MAURO LA TORRE

La prelegoj alfabete laŭ la familia nomo:

- Julián Hernández Angulo (Kubo): La kultura dimensio de Esperanto dum la instruado en Kubo
- Marija Belošević (Kroatio): Esperanto - ponto inter la kulturoj
- Duncan Charters (Usono): Aliro al kulturoj pere de la lingvo Esperanto - diversaj aspektoj-
- István Ertl (Luksenburgo): Lerni per tradukado
- Zsófia Kóródy (Germanio): Nova retkurso kaj modula klerigado
- Monika Molnar (Svislando): Kulturplena, bunta lerneja korespondado
- Barbara Pietrzak (Pollando): Pli ol la centjarduona trezoro de la E_parolkulturo en la programoj de la E-Redakcioj de Pola RetRadio fronte al profundigo de la konoj pri kulturoj pere de la lingvo Esperanto
- Keyhan Sayadpour (Irano): La persa kulturo pere de la lingvo Esperanto
- Renée Triolle (Francio): Esperanto, kaŝita interkulturilo

103a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO – LISBONO 2018, 28 JULIO – 4 AŬGUSTO

Pri lundo kaj mardo, ni devas emfazi, ke lastmomentaj ŝanĝoj povos okazi; oni serĉu post alveno pli freŝajn informojn. AMO 50 okazos en la kongresaj ĵaŭdo kaj vendredo.

# Plia rumana kongreso, emfaze je partopreno kaj klerigo

Venis kelkaj proponoj pri la loko kie okazos la kongreso; la estraro elektis la urbon **Gherla,** la semajnfinon **14-16 septembro,** la ĉefa organizanto estas la surloka instruistino Mariana Berariu.

Kostoj: **2 tranoktoj, 6 manĝoj = 180 leiojn**. (proks. 39 eŭroj)

Gerla estas historia urbo 42 km. norde de Cluj-Napoca – fervoje kaj aŭtobuse atingebla de tie. Cluj mem estas atingebla trajne kaj buse kaj aviadile (flugoj el Munkeno, Dortmund, Frankfurto, Bologna, Romo, London Luton, Dublin, Charleroi, Alicante, Barcelono, Ateno, Bukuresto, Constanta kaj eble pliaj urboj.  Multaj el tiuj flugoj estas moderkostaj.

La loĝkondiĉoj estas similaj al tiuj en la pli fruaj renkontiĝoj en la apuda Rascruci, vidu ĉe la sekva adreso de la kongresejo (rumane, hungare, germane kaj angle):

http://www.cazareinromania.com/cazare/gherla/fundatia-teka-764

Gherla havas prezentaĵon en Esperanto en Vikipedio: https://en.wikipedia.org/wiki/Gherla





La renkontiĝo konsistos el landa kongreso (agad- kaj financa raportoj, elekto de nova estraro), prelegoj, paroliga kurso, kleriga duontago, ekskursoj).

Ni lanĉas novan programeron dumkongresan: Kleriga Duontago. Niaj kongresoj devus esti ne nur lokoj por kunsidoj, sed ankaŭ studejoj kaj partoprenejoj. Ni venas al la kongresoj ankaŭ por interŝanĝi niajn spertojn, lerni novajn aferojn, transdoni niajn ideojn al aliaj. Jen la celo de la Kleriga Duontago. Do, la temoj povas esti diversaj: prezento de libro, E-agado, tiklaj gramatikaĵoj, arto, kulturo, sporto, ludo ktp, ktp. La daŭro povas esti inter 3-15 minutoj, en la lingvo Esperanto. La aranĝo specife provas allogi junulojn per tiuj partoprenigaj proponoj. Tio inkluzivas iujn lernintojn per Duolingo.

La organizantoj invitas al partoprenontoj, precipe novuloj, pripensi kaj sciigi la organizantojn (Mariana Berariu kaj min) pri la temoj prezentotaj. Ni  kuraĝigas al la komencantoj prepari materialojn, estus bona okazo por ili ekzerci la lingvon. Ni atendas la proponojn ĝis la 10-a de julio.

Ne hezitu partopreni la aranĝon; estas bona okazo por esperantumi, t.e. paroli la lingvon, ekscii novaĵojn, plibonigi la lingvosciojn kaj sperti amikan etoson!

Ni varme invitas vin al Gherla kaj atendas vian respondon

Aurora Bute

Vortoj = 595

============================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento nun tute ĝisdata ĝis 2018-14. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.